# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 58, Numero 10, oktobro 2023*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Estrarkunveno de EFNSK

*Nicole Else, sekretario de EFNSK*

La 3an de Oktobro okazis la monata estrarkunsido. La estraro dungis tegmentiston por ripari la fabrikon. Nova telefono kun respondilo estis aĉetita. Kelkaj Esperantistoj kune tendumis la 30an de Oktobro kaj 1an de Novembro. La federacio ricevis monon pro la heredaĵo de Volo Gueltling. Ni havas 2 novajn membrojn. Ni diskutis la plibonigon de nia retejo kaj decidis ripari la barilon apud Esperanto-domo. La Zamenhoffesto okazos dimanĉon la 17an de Decembro.

## Mia Operacio

*Alan Turvey, direktoro de EFNSK*

La 18-an de oktobro mia brusto estis malfermita kaj mia koro haltigita. Antaŭ tio la kirurgoj faris tranĉon en miaj du kruroj por uzi tiujn vejnojn. Dum mia koro estis maldisponebla meĥanike, sang-pretervojoj estis instalitaj en mia brusto per miaj gambo-vejnoj. Valvo, kreskigita el bovina histo estis enmetita por anstataûigi mian propran misfunkciantan aortan valvon.

Estas du aferoj, kiuj povas misfunkcii kun valvoj. La folioj povas iĝi difektitaj aŭ apartigitaj, aŭ ili povas iĝi malmolaj pro mineralaj deponoj. Por mi, ambaû estis.

Mi estis kunmetita denove kaj nur vekiĝis la sekvan tagon. Mi vekiĝis kaj trovis tubojn ĉie. En mia gorĝo ekzemple. Mi estis spiranta tra tubo.

Kateteroj estis en miaj du brakoj, unu en mia kolo. Grandaj cikatroj estis laŭ miaj kruroj.

El mia brusto eliris drena tubo. Kaj "paŝad-dratoj" pendas de mia brusta areo konektitaj al kor-monitoro. Neniu diris al mi antaŭe, ke estos ankaŭ urina tubo por komfortigi min pri la deziro urini.

Mia sugesto estas: evitu operaciojn. Ili forprenas multon de vi. Ili ne estas amuzaj. Estas multaj konoj. Preventado estas pli bona. Prizorgu vin. Faru vian ekzercon. Manĝu bone.

Mi spertos ses semajnojn da rehabilitado.

La operacio igis min pli kolorema. Mi havas mankon de sendependeco. Mi ne povas veturi dum 6 semajnoj pro la timo de la sternumo movo se mi turnas la stirilon tro forte.

Mi ĉagreniĝas ĉar mi ne povas levi ion pli ol 2,5 kilogramojn.

# Ŝakludkonkurso

*Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK*

La 14-an de oktobro en la Esperanto-domo okazis Ŝakludkonkurso. Kam Lee venis al Sidnejo el Hobarto por partopreni ĝin.





8 partoprenantoj partoprenis la konkurson. 2 grupoj estis formitaj po 4 ludantoj en la grupo.
La konkurso komenciĝis je la 14:00. Ŝakludantoj ludis 3 ludojn. La du plej suksesaj ludantoj de grupo ricevis la rajton ludi en duonfinalo. Kam Lee venkis en la grupo 1 (3 venkoj el 3 ludoj), Asad estis la dua (2 el 3). La venkisto de grupo 2 estis Riyola. Ŝi venkis ĉiujn ludojn. La dua estis Lawrence (2 el 3).

Je la unua duonfinalo Kam ludis kontraŭ Lawrence kaj perdis (1:2). La duan duonfinalon venkis Riyola kontraŭ Asad (2:0).

Je la finalo Lawrence venkis Riyola 0:2 kaj iĝis la nova gajnanto de la trofeo.

Ankaŭ okazis superfinalo en kiu la nova ĉampiono ludis kontraŭ la lastjara ĉampiono Selina. Ŝi venkis dufoje kaj restis la plej suksesa ludanto de nia ŝakludklubo.





EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 09:00 ĝis 11:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo: 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Luŝnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estraranoj: | Adam Levy, Terry Manley |

